N. N. 42,

La dom' je leviĝanta sun'

tradukita de Joachim Gießner

Jen estas dom' en New Orleans,
"la leviĝanta sun"'.
Kaj mizer' por multaj viroj estas ĝi,
Kaj tia estas mi nun.

Patrin' vestaĵojn kudris,
ĉemizojn kaj blue jeans,
La patro, kartojn ludis li
en dom' en New Orleans.

Kontenta estas ludemul'
en firestoraci',
kaj tiam tage-nokte nur
ebria estas li.

Ho panjo, kion faris mi,
al gefratoj diru nun,
ke ili ne pereu en mizer'
en ka dom' je leviĝanta sun'.

Mi estas hejme tagon nur,
sed tiris min io for.
Reiras mi al New Orleans,
atendos min dolor'.

Ĉar jen estas dom' en New Orleans,
"la leviĝanta sun"'.
Kaj mizer' por multaj viroj estas ĝi,
kaj tia estas mi nun.

Traduko de la Angla poemo "The House of the Rising Sun" de N. N. 42 en Esperanton de Joachim Giessner *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-719-1445 (2012-12-10 11:16:36)

S-ano Joachim Giessner verkis tiun ĉi tradukon laŭ la versio, kiun kantis la brita muzik-grupo The Animals.